# NIA VOĈO

Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4ºB-EXT. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde je la 18,30 horo en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas Manolo Parra
manolo.parra@yahoo.es

**MAJO 2010**


KAFKUNVENO
Okazis la dimanĉon 9an de majo kunveno en kafejo 4D, placo Jacinto Benavente, kunvokita kiel kutime per la retpoŝta listo "esperanto-madride". Ĉeestis kvin homoj.
Ŝajne oni trovis la definitive taŭgan ejon por tiaj kunvenoj.

LAŬTLEGADO KAJ LIBROPREZENTO
La tradicia legado de Donkiĥoto en Esperanto okazis kiel planite en la Círculo de Bellas Artes. Ĉi-foje rolis ĉe la pupitro Faustino Castaño, sekretario de Astura E-Asocio, kaj Miguel Fernández. Tuj sekve, sed ne samloke, SATeH prezentis la novan libron de Antonio Marco "Crónicas del movimiento obrero esperantista", en ĉeesto de deko da homoj (ĉiuj jam konataj).

**KURSOJ**
Pedro A. Hernández gvidas konversacian kurson en la HEF-ejo la vendredojn vespere. Por informiĝi kaj aliĝi, sendu malplenan mesaĝon al la retadreso: esperantovallekas-subscribe @yahoogroups.com

**EN HISPANIO**

Nia kara Miguel Gutiérrez Adúriz estas ĵus reelektita kiel membro de la Akademio de Esperanto, laŭ informo de Libera Folio.
Plej koran gratulon !!!

ORDINARA ĜENERALA KUNSIDO de HEF
La Prezidanto de HEF alvokas vin ĉeesti Ordinaran Ĝeneralan Kunsidon, kiu okazos la 13-an de majo de 2010 (ĵaŭde), je la 18:00 horo (je la 18:30 horo dua alvoko), en la oficejo de la asocio, strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7, Madrido, laŭ la jena tagordo:
1.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2009.
2.- Aprobo de la Raporto pri aktivaĵoj de 2009.
3.- Aprobo de la Buĝeto por 2010.
4.- Sugestoj kaj demandoj.

INTERNACIISMA RENKONTIĜO EN REUS
la 21an, 22an kaj 23an de majo okazos la renkontiĝo de Kataluna Esperanto-Junularo en Reus.

La provizora programo inkluzivas i.a. debaton pri la situacio de malplimultaj lingvoj, tradician katalunan ludon, popoldancojn, koncerton de JoMo , kelkajn erojn por ne esperantistoj kaj multe da festumado.
Estas luksa senpaga amasloĝejo. Por iom pli da komforto, bonprezajn hotelojn tuj apude, kie tranokti kostos po 20 eŭroj proksimume.
Informoj kaj aliĝoj: http://esperanto.cat/reus2010/hejmo_eo.htm

**AMASMEDIOJ**

La Ekstremadura ĵurnalo Hoy je 19ª aprilo amplekse raportis pri ĵus okazinta kunveno en Don Benito de lernejanoj el Portugalio, Italio kaj la urbeto Don Benito, uzantaj Esperanton por amikiĝi dum unu semajno.

La regiona tagĵurnalo Global-Castilla La Mancha la 30an de aprilo aperigis ampleksan kaj pozitivan artikolon pri Esperanto.

La tutlanda ĵurnalo El Mundo aperigis la 3an de majo artikolon de la senatano Pío García-Escudero, kun pozitiva aludo al Esperanto, uzata por argumenti sian kontraŭstaron al uzado de la kvar hispaniaj lingvoj en la Senato.

**TRA LA MONDO**

MEMORE AL ZAMENHOF EN ĈINIO

La 17an de aprilo oni rememoris nian Majstron, D-ron Zamenhof, okaze de la datreveno de lia forpaso, la 14an de aprilo. La aranĝo okazis en la sidejo de la Esperanta Asocio de Kantono, Ĉinio.

Kelkaj samideanoj parolis pri nia Majstro, kaj pri lia kuraĝa kaj konstanta laboro por la bono de la homaro. Inter la parolantoj troviĝis s-ro Petro Ye, Vicprezidanto de la asocio, s-o Davido, universitata profesoro, kaj Augusto Casquero, hispana esperantisto.

La salono estis plenplena. Fakti eĉ mankis sidlokojn.

Augusto

PROFESIA DOKUMENT-FILMO PRI ESPERANTO

"Utopia in Four Movements" estas usona anglalingva filmo en kiu Esperanto ludas gravan rolon. Ĝi estis prezentita januare en usona filma festivalo. Kelk mil homoj, multaj spertuloj pri filmoj, jam vidis la novan profesian filmon pri Esperanto kaj idealismo pli ĝenerale (kaj miloj pli legis pri ĝi). Jen kelk-minuta eltranĉaĵo/eltiraĵo: http://vimeo.com/10903101

---

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

La sabaton 12an de junio je la 20:00 horo okazos deklamado de poemoj de Miguel Hernández, okaze de la centjariĝo de lia naskiĝo, en esperanta traduko de Miguel Fernández Martín, ĉe la monumento al la poeto en Parque del Oeste, ĉe la suba pinto de Paseo Ruperto Chapí, metroo Moncloa. Deklamos Ana Manero kaj Miguel Fernández.

Niaj **konversaciaj rondoj** okazas ĉiulunde ekde la 18:30 h en la HEF-ejo, strato Rodríguez San Pedro 13-3º-7, tel. 914 468 079.

**********************************************************************

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6-4ºB-EXT
28005 MADRID